

Mesaĝoj de la 159-a Ĝenerala Konferenco de la Eklezio

Sallago Urbo, Utaho, Usono
1-an kaj 2-an aprilo 1989

El la Parolado de Prezidanto Ezra Taft Benson

La fiero estas universala peko kaj la ĉefa kialo por ke membroj de la Eklezio ne progresu kaj por ke ili pli prizorgu la plaĉon de homoj ol la plaĉon de Dio.

Mi scias, ke Dio volas ke ĉi tiu mesaĝo estu eldirita je ĉi tiu tempo.

Plej parte, la homoj pensas pri fiereco kiel malmolesteco, trosinŝataĵo, kaj aroganteco. Tiuj ĉi aferoj estas bazaj eroj de la peko, sed la centra trajto de fiereco estas malamikeco - malamikeco cele al Dio kaj cele al aliaj homoj. Ĝi estas malamo kaj kontraŭstaro. Ĉiam esperante, ke Dio konsentos pri siaj opinioj, la fiera homo ne deziras ŝanĝi siajn opiniojn por ke ili konsentu kun la deziroj de Dio.

Fieraj homoj ŝajnas mezuri sinvaloron kaj siajn talentojn kaj kapablojn kontraŭ la talentoj kaj kapabloj de aliaj. Ili interpretas la sukceson de aliaj kiel malsukceson por si mem. Ili zorgas pli pri la alteco de la salajro kaj ĉu ĝi estas pli ol la salajro de aliaj ol ĉu ĝi sufiĉas por siaj bezonoj. La fiereco kondukas al sekretaj kombinaĵoj por gajni povon super aliaj. La fiereco nutras disputojn, batalojn, generaciajn breĉojn, eksedziĝojn, tumultojn kaj aliajn malbonaĵojn. Jen la malamikeco nomita fiereco.

Kiam la fiereco posedas la koron, sendependeco el mondaj aferoj perdiĝas kaj libereco liveriĝas al homa juĝo. Mondaj aferoj kriegas pli laŭte ol la flustroj de la Sankta Spirito.

Kutime riĉajn kaj pli edukitajn homojn oni asociigas kun la fiereco. Sed, ankaŭ malriĉaj homoj kulpas. La fiereco evidentiĝas laŭ multaj manieroj - per klaĉo, malĝustaj kritikoj, kalumnio, envio, avidaj agoj, retenado de danko aŭ laŭdo, kiu povus altigi la animon de aliaj, nepardonemo kaj ĵaluzo.

Pensu pri la pentado, kio okazus kaj la vivoj, kiuj pliboniĝus, se la fiereco ne haltigus la konfeson kaj la forlason de pekoj.

Forlasu fierecon, estu humila, pardonu la malperfektaĵojn de aliaj, faru sindonajn agadojn, kaj servu homojn kaj nian Ĉielan Patron.

Eltiraĵo el la Parolado de Gordon B. Hinckely, Unua Konsilanto al la profeto

Amo, la konstanta, ĉiam havebla kvalito kiu havas la povon levi nin super la malbono, la konflikto, kaj la problemoj de la mondo, similas la nordan stelon. Kiam mi estis juna knabo loĝanta en bieno, milionoj da steloj vidiĝeblas. La steloj ŝajnis movi laŭ la rotacio de la tero, sed la norda stelo tenis sian pozicion en linio kun la akso de la tero. Je juna aĝo mi rekonis ĝin kiel ankron en ĉielo kiu ŝajnis esti ŝanĝiĝema.

Tra jarcentoj, la maristoj uzis ĝin, ankaŭ konata kiel la gvidstelo, por gvidi ilin dum iliaj vojaĝoj. Ili fiksis la biron laŭ ĝia konstanteco kaj tiel do, evitis iradon en malĝustan direkton dum ili vojaĝas trans la vastaj, nemapitaj maroj.

Amo similas la nordan stelo ĉar en ĉiam ŝanĝiĝema mondo, ĝi amo, estas konstanta. Ĝi estas la esenco de la evangelio. Ĝi estas la sekureco de la hejmo, la sekurigo de la komunumo, la signalfajro de espero en mondo plena da afliktoj.

Dio montris Sian amon al Siaj infanoj per la plano de savo. Li sendis Sian solenaskitan Filon, Jesuo Kristo, al la mondo. Jesuo, do, donis Sian vivon kiel oferon por ke ĉiuj povu supervenki pekojn kaj reveni al Dio.

Jesuo, nia Savanto, estas la granda ekzemplo. Lasu amon esti la gvidstelo de la vivo, kun la absoluta certeco ke per la amo de Dio la Eterna Patro kaj Lia Amata Filo, la savo el la katenoj de morto estas certa. Lasu ke, tia dia amo verŝu sur nin, estu spegulata en niaj vivoj al la aliaj infanoj de nia Ĉiela Patro.

Lasu amon esti gvidstelo de nia vivo, dum ni provas helpi tiujn, kiuj bezonas nian forton. Inter ni estas multaj homoj kiuj estas solaj kaj havas doloron. Kuraciloj helpas, sed agrablaj vortoj povas okazigi miraklojn. Estas multaj homoj kiuj iras en timigaj cirkonstancoj kaj estante timigitaj ili ne povas lukti. Ili bezonas nian amon.

Lasu amon esti la gvidstelo en la hejmo. Gepatroj ne diru malmildajn, severajn vortojn al la infanoj. Amo estas la esenco de familia vivo. Kiam amo regas hejme, belo estas ĉie.

Estu donacema per via havaĵo kaj helpu tiun, kiu havas malsaton, malriĉecon, malsanon kaj mizeron. Per speciala fasto, 10.5 milionoj da dolaroj estis kolektitaj kaj donitaj por helpi malsatajn homojn tra la mondo. Multaj homoj fastis kaj donis la monon, kiun ili ŝparis per la fasto al fonduso por la malsataj. Estas rimarkinde ke tiom da personoj zorgas pri iliaj gefratoj. Mi sentas min optimisma pri tia amo kaj zorgo kian montris dekmiloj da homoj. Tia amo estas la granda konstanto de nia laboro.

Eltiraĵo el la prelego de Houard W. Hunter, Prezidanto de la Konsilantaro de la Dek-du Apostoloj

Dio estas Dio de mirakloj. Tio evidentiĝas per la renovaĵoj kaj renaskiĝoj en naturo, kiuj okazas printempe. Jesuo faris multajn miraklojn. Li ŝanĝis akvon al vino ĉe edziĝfestoj en Kanao. Neniu povas klarigi tiun miraklon ĉe la edziĝfestoj kaj neniu povas klarigi la ĉiutagan miraklon de la vinberejoj.

Kiam ni ekrekonas la multajn kaj benitajn manifestaĵojn faritajn de Dio en la vivo; la ĉiutagan specon - tiel bone kiel ni rekonas la redonon de vidpovo al la blindulo kaj la aŭdpovon al la surdulo, ni povos vere miri pri la neklarigeblaj principoj kaj metodoj, kiuj kaŭzas tiajn miraklojn.

En la naŭa ĉapitro de Johano, ni legas raporton pri Jesuo kiu dufoje donis vidpovon al viro - unufoje, Li rebonigis denaskajn neperfektaĵojn kaj aliafoje por ke viro vidu la Reĝon de reĝoj rekonante lin kiel la Mastron.

Nepras la fido antaŭ la miraklo, sed ankaŭ pligrandiĝo de fido sekvu la miraklon. Kiam oni persone vidis ĉi tiujn mirindaĵojn, kiujn Dio faris, respekto kaj amo al Li devas pligrandiĝi kaj ties konduto devas pliboniĝi.

(Dum la prelego de Prezidanto Hunter, li momente perdis sian ekvilibron kaj falis malantaŭen. Ne mankanta eĉ unu vorto, li daŭrigis sian paroladon per trankvila kaj firma voĉo.)

Post la fino de la parolado, Prezidanto Monson, kiu gvidis la kunvenon, diris ke la temo de la parolado de Prezidanto Hunter tre taŭgas. Li diris, "Ĉiuj, kiuj aŭdis lian voĉon; ĉiuj, kiuj vidis lin marŝi vidis veran miraklon, eble ne unu miraklon sed du, Prezidanto Hunter." Prezidanto Hunter respondis per vigla kapjeso kaj larĝa rideto. Li estis en radseĝo dum la pasinta jaro kaj povas marŝi al la legpupitro nur helpate de marŝilo.

Prezidanto Monson daŭris, "Estas dirite, gvidu nin, ho, gvidu nin, Granda Formanto de homoj, el la mallumo denove por strebi. Prezidanto Hunter estas rimarkinda ekzemplo."

El la Parolado de Joseph B. Wirthlin, membro de la Konsilantaro de la Dek-du Apostoloj

Prosperu Malgraŭ Malfeliĉoj

En Meksiko estas fortika planto, kiu bone kreskas malgraŭ tre malfavoraj kondiĉoj. Ankaŭ ni devas kreski, prosperi, kaj abunde produkti bonan frukton malgraŭ la ĉiutagaj malbono, tento, kaj kritiko kiuj nin trafas. Por tion fari, ni devas radikigi firme en la fekundan teron de la evangelio de Jesuo Kristo.

Prefere, ni serĉos nur komforton kaj facilecon sed ni nutros en niaj koroj, semojn kiuj ebligas nin kontraŭstari tenton, pekon kaj malbonon.

Ni devas planti kaj nutri la semon de fido, je Jesuo Kristo. Ni devas evoluigi fidon kiel Nifai por fari tion, kion Dio ordonas, sciante ke ĉiu ordono estas donita por nia beno.

Ni devas nutri la semon de fido, tiu semo kiu donos al ni la kuraĝon sekvi la admonon de la profetoj.

Ni devas semi interne en niaj koroj la semon de amo, la vera amo de Kristo; li, kiu montris al ni la perfektan modelon de amo. Mi opinias ke nia progreso al ekzalto kaj eterna vivo dependas de kiom bone ni lernos la principon de amo.

Ni devas nutri la semon de amo, harmonio, kaj unueco en la hejmo kaj familio. Gepatroj devas ne lasi la instruon de la infanoj al hazardo, ili mem devas estri siajn familion kaj hejmon.

Ni devas planti la semon de atesto - firma, neŝanĝebla konvinko pri la vereco kaj dieco de la Evangelio de Jesuo Kristo; atesto, kia ne povas disiĝi per homaj povo kaj persvado. Tia humila, fervora atesto de la Sankta Spirito efikas pli ol vi povas imagi.

Kiam la nuna profeto, Ezra Taft Benson, estis oficialulo por la usona registaro, li vizitis Ruslandon. Dum la vizito, je la invito de Patro Aleksandro, li donis paroladon kaj fervoran ateston pri la Evangelio kaj la dieco de Jesuo Kristo. Dum la atesto, multaj ĉeestantoj estis kortuŝitaj kaj la larmoj falis el iliaj okuloj. Post multaj jaroj, Patro Aleksandro diris, El la multaj famkonataj personoj kiuj surskribis la gastlibron en mia preĝejo, la plej grava estas Ezra Taft Benson.

Patro Aleksandro rekonis Ezra Taft Benson kiel grandan, spiritan gvidanton, eĉ se li, je tiu tempo estis oficialulo de la usona registaro. Fervora atesto pri Jesuo Kristo efikas.

El la Parolado de Russell M. Ballard, Membro de la Konsilantaro de la Dek-du Apostoloj

Dum la pasintaj ses-dek jaroj, la televida industrio disiĝis tra la mondo. Pli ol 2.5 milionoj da homoj vidas televidajn programojn ĉiutage.

Volumoj estas skribitaj pri la malbonaj efikoj de televidaj programoj je la konduto de infanoj kaj junuloj eĉ plenkreskuloj. La menso de homo ne povas eviti la malbonajn rezultojn de perfortaj kaj nemoralaj programoj dissenditaj televide.

Mi esprimas malkontenton, malkonsenton, kaj ofendon pri la televidaj programoj kiuj

atentigas nin pri perforto, avareco, profanaj kaj malĉastaj agoj, kaj malestimo kontraŭ bonaj tradicioj. Mi opinias ke la ĉefa celo de televido povas esti la plifortigo de la vorto de Dio. Rigardado al televido povas doni al ni aŭ problemojn aŭ profitojn.

Familioj kiuj limigas la ĉiutagan televidan rigardon ĝis maksimume de horoj, kaj kiuj zorge elektas bonajn programojn, ĝuas signifoplenajn avantaĝojn. Tiuj avantaĝoj inkluzivas plibonajn familiajn interrilatojn; pli da bonaj konversacioj inter familiaj membroj, kaj ili lernas starigi sistemon de familiaj valoroj.

Lernu pri mondaj aferoj, provu kompreni kaj toleri kaj taksu diversajn aferojn. Faru bonajn kontribuojn al socio per servado kaj zorgado. Estu en la mondo sed ne estu de la mondo. Ne sekvu malĝustajn vojojn aŭ kliniĝu aŭ cedu por akomodi tion, kio estas malvera. Ni povas kaj devas vivi en la mondo.

La Mastro ne bezonas socion, kiu sin kaŝas kaj izolas sin for de la mondo. Prefere, Li bezonas kuraĝajn individuojn kaj familiojn kiuj vivas kiel ekzemploj kaj kiuj elmontras, ke ĝojo kaj plenumo en la vivo venas, ne per mondaj aferoj, sed per la Sankta Spirito kaj la doktrino de Jesuo Kristo.

Laŭ mia opinio, ni devas unuiĝi kun aliaj zorgemaj personoj kiuj kontraŭstaras televidajn programojn, kiuj detruas la moralajn de familioj kaj nacioj.

El la Parolado de Dallin H. Oaks, membro de la Konsilantaro de la Dek-du Apostoloj

Kromaj Voĉoj

En la ĥoro de voĉoj aŭdataj dum la mortema vivo, oni devas rekoni la voĉon de la Bona Ŝafisto, Jesuo Kristo.

Miaj paroloj aludas al tiuj voĉoj, kiuj parolis pri Dio kaj Liaj ordonoj kaj pri la doktrinoj, ordinacioj kaj praktikoj de Lia Eklezio. Iuj el tiuj, homoj kiuj parolas pri ĉi tiuj temoj estas donitaj la aŭtoritato tion fari. Aliaj homoj, kiujn mi elektas nomi kromajn voĉojn, parolas pri ĉi tiuj temoj sen la alvoko aŭ la aŭtoritato de Dio.

La Eklezio ne provas izoli siajn membrojn el kromaj voĉoj sed preferas, ke ili sekvu la konsilon de la profeto Jozefo Smith, kiu diris, "Instruu ĝustajn principojn kaj tiam, lasu, ke la homoj regu sin mem."

La Eklezio havas la respondecan instrui al la membroj tion, kio estas la voĉo de Dio kaj la Eklezio, kaj kio ne estas tia voĉo.

Taksinte la informadon de kromaj voĉoj, la serĉanto de la vero pri Dio, devas fidi je persona revelacio de Dio. Per studado de la Sanktaj Skriboj, fido je Dio kaj persona virto kaj preĝo,

oni preparas sin ricevi tian revelacion.

El la Parolado de Hugh W. Pinnock, unu el la Prezidantoj de la Unua Kvorumo de la Sepdekuloj

Ĉi tiu tempo ŝajnas esti la epoko kulpigi ĉiujn, kaj ĉion pro ia ajn nefavora kondiĉo. Ni kulpigas konatulojn, gepatrojn, la Eklezion, najbarojn, aŭ eĉ iam la veteron pro niaj problemoj. Ĉi tio ne estas korekta. Oni devas preni al si la respondecon pri si mem, ne kulpigante aliulojn.

Kompreneble, oni povas sperti kordisŝirajn suferon kaj doloron pere de kruelaj, malhonestaj aŭ malbonaj homoj. Akcidentoj okazas kaj ili povas kaŭzi teruran doloron kaj fojfoje ili povas kaŭzi vivdaŭran handikapon. Sed, juĝo, kulpigo kaj malpardoneco ĉiam intensigos la problemojn kaj la solvoj estas prokrastitaj.

Tro ofte tiuj, kiuj havas problemojn atendas ke la registaro, la Eklezio aŭ alia instituto, efektivigas solvojn po iliaj problemoj. Kial ni demandu aŭ eĉ volu ke alia persono provizos al ni tion, kion ni bezonas, se ni mem povas provizi ĝin?

Amemaj kaj subtenaj gepatroj, ekleziaj gvidantoj, lertaj kuracistoj, kaj eĉ riparistoj povas subteni nin, sed estas malprave atendi ke iu el ili faru por ni tion, kion ni mem kapablas fari.

Estas kvar paŝoj per kio ni povas plifortigi fidon je Dio kaj plibonigi la vivon.

Unue: Ni devas voli ŝanĝi kaj plibonigi la vivon.

Due: Pensu pri la direktivoj donitaj de la profeto kaj la Sanktaj Skriboj. Ofte kiam la tagoj ŝajnas esti la plej mallumaj kaj la vivo estas malfacila, legu la Sanktajn Skribojn, ili donos al vi forton kaj sekurecon tian, kia povas veni nur per la Sankta Spirito. Oni devas mem plifortigi sian ateston pri Dio kaj memstare plibonigi sian personecon. Aliuloj ne povas fari tion; oni devas fari tion por si mem.

Trie: Vivu laŭ la ordonoj de Dio. Alia persono ne povas penti por vi. Tiu tasko eblas nur sole. Pensu pri la tagoj, semajnoj eĉ la monatoj kaj jaroj forĵetitaj dum personoj atendas, ke iu aliulo alprenos la respondecon pri iliaj bezonoj. Ĝi ne povas okazi.

Kvare: Ni, ĉiuj, havas la taskon kaj devon helpi aliulojn, kiuj vere bezonas helpon. Sed memoru, fari por aliaj taskojn, kiujn ili devas fari por si mem, ne helpas ilin sed vere kondukas al malprofito por ili kaj malfortigos ilin.

Krome ne fidu, ke aliuloj povas interpreti la Sanktajn Skribojn por vi. Ne forĵetu la prudenton aŭ forgesu la inspiron, kiu venas de Dio kiam ni agas respondece.